# starto

ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO




1979 · 3 ·(73)




ENTREPRENO »KLENOTY«

# starto

ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO




1979 · 3 · (73)

# Elektronika komerc-kvalita automobila anteno EKA 01



Apliko:

Elektronika komerc-kvalita automobila anteno EKA 01 ebligas plibonigi ricevon de radioelsendado en aŭtomobilo. Samtempe ĝi ebligas munti la antenon plej malproksime de fonto de perturbano (sparkado de motoro, dinamo, alternatoro, regulilo). Oni muntas ĝin sur karpserion de aŭtomobilo kaj en kazo de pli kurta distanco inter la loko por alfikso de anteno kaj radioricevilo oni povas mallongigi la alkondukan samaksan kablon.

TESLA
BANSKÁ BYSTRICA N.P.
ZVOLENSKÁ CESTA čís. 18





# SORĈAJ TAGOJ APUD BALTA MARO



Printempo, tiu vorto mem estas ŝimbolo de beleco, nova vivo, ĝojo. Mi povas ŝen troigo diri, ke la IV. Ĉebalta Esperantista Printempo, kiun mi partoprenis en Ustronie Morskie (Pollando) estis simbiozo de ĉio supre menciita.

Belega naturo, neforgeseblaj varmaj tagoj ĉe balta maro, trankvileco, interesa plenvalora programo, sed ankaŭ riĉa manĝaĵo kaj perfekta organiza laboro ĉefe dank al Ewa Kuligowska, ĉefsekretarino de PEA, estis por reprezentantoj de 8 nacioj faktoj ne ĉiam troveblaj dum Esperantaj arangoj. La arango estis solene inaŭgurita en ĉeesto de lokaj autoritatoj. La ripozloko Ustronie Morskie, same kiel proksimaj urboj, estis delikate ornamitaj per afiŝoj kaj transparentoj.

Ĉiu povis trovi dum tiu semajno sufiĉe da interesaĵoj por si. Ni partoprenis koncertojn, prezentadon de filmo pri Kozsalin, trarigardis urbojn, sed ankaŭ grandegan komplekson de ŝtata bieno, kie nin akceptis direktoro de la entrepreno. Oni povis rajdi sur ĉevalon, kanti ĉe bivakvajro, baki kolbasojn kaj vespere danci. Ne estas mia celo raporti. Mi volis nur esprimi mian admiron kaj dankon. Mi bone scias, kia laboro ĝi estis kaj kiel malfacile prepari ĝin helpe de volontuloj.

Mi volas atentigi ĉiujn, kiuj ankoraŭ ne decidiĝis pri sia libertempo: Ne atendu kaj aliĝu tuj ĉe ni! Somero estas antaŭ ni kaj atendas nin ankaŭ autuno. Liston de arangoj preparitaj de PEA vi trovos aliloke. Kaj travivu ankaŭ similajn m i r a k l a j n tagojn. Elkore tion deziras al vi

Z. Křimský

# MEM·peranto

La sekvaj vortoj estas parto de la parolo de la prezidanto de MEM, d-ro J. Pethes, antaŭ la partoprenantoj de solidareca konferenco kun Vjetnamio en Helsinki, marton 1979, prezentita - unuafoje dum la aranĝo de Monda Packonsilio - en la Internacia lingvo:

Estimata Prezidantaro!
Tre estimataj Delegitoj!

En la nomo de Mondpaca Esperantista Movado estimplene mi salutas ĉiujn partoprenantojn de tiu ĉi Konferenco. Nia movado estas bazita sur la tendaro de multmilaj popolanoj parolantaj la internacian lingvon Esperanton. En nia rondo bone konataj diversnaciaj sciencistoj, artistoj, verkistoj kaj laboristoj agadas en amikaj kontaktoj por la Paco.

Ekde la fondiĝo de nia organizo - dum 25 jaroj - per apliko de Esperanto kaj reciproka interkomprenigo, ni evoluigis la kontaktojn - senkonsidere al religia, rasa kaj politika platformo - kun ĉiuj popoloj, organizaĵoj kaj individuoj, volantaj defendi la pacon.

Surbaze de tiu agado ni kreis amikan rilaton ankaŭ kun la vjetnamaj esperantistoj, en niaj aranĝoj kaj presorgano "Paco" ni firmigis la solidarecon al Vjetnamio, ni subtenis ĝian justan batalon. Post kiam la heroa popolo de Vjetnamio venkis la invadon de Usono kaj komencis la pacan rekonstruon de sia lando - en la jaro 1975 - ŝajnis, ke oni povas forgesi la devizon: "For la manojn de Vjetnamio!"

Tiam ni konsideris ebla, ke - per la internacia lingvo Esperanto - ni povos konatiĝi pli facile kun la kulturo kaj evoluo de Vjetnamio, kun la pacema konstrulaboro de la vjetnamaj homoj. Tiel ni volis servi la noblan celdifinon, baziĝantan je la kreo de Esperanto, efektivigi la interkomprenigon kaj proksimiĝon de la diversnaciuloj, parolantaj malsamajn lingvojn. Mallonge: per niaj kontaktoj ni deziris helpi al la vjetnama popolo por estigi la cirkonstancojn de la paca vivo.

---

■ **ĈSSR - la kvara en UEA** ■

"Esperanto" n-ro 3/1979 publikigis laŭlandan liston de la UEA-membroj ( asociaj kaj individuaj) dum la jaro 1978. La kvinon de la "plej fortaj" landoj estras Pollando (sume 4 262 m.). Sekvas ĝin Bulgario 4 190, Hungario 3 255, ĈSSR 1 733 m. (1 595 asociaj, 138 individuaj), Svedlando 1 702.

La kvinon postiras iuj el la "grandaj landoj", ekz. Brazilo 1 528, Britio 1 208, Francio 1 234, FRG 1 432, Japanio 1 328, Usono 443. GDR havas 523 UEA-membrojn, Vjetnamio 3 (indiv.), Ĉinio 1.

(jm)



**Chemika**
komerca entrepreno
**BRATISLAVA**

PROGRAMO DE LA AGADO:

- aĉetado kaj vendado de la produktoj de ĥemia, kaŭĉuk - prilabora kaj plastofara industrioj, kaj en la propra reto de pomalgranaj vendejoj
- alĝustigado finala preparado kaj pomalgranda pakado de ĥemiaj produktoj por la enlanda merkato
- fabrikado, aĉetado kaj vendado de la teĥnikaj gasoj

# Dek mil interesitoj...

Proksimume tiom da personoj en Sovetunio interesiĝas pri la internacia lingvo Esperanto. El ili duono lernas ĝin en 90 rondetoj ĉe sindikataj kluboj, kulturdomoj, urbaj kaj regionaj komitatoj de komsomolo. La ĉefaj agadformoj estas lingvolernado, aranĝado de programvesperoj, korespondado. Ĉi-tiujn kaj aliajn faktojn konigas sur sep paĝoj de sia esperantlingva suplemento la 16a numero de Moscow News ( Moskvaj Novaĵoj) konekse kun la fonda konferenco de Asocio de sovetiaj esperantistoj (ASE).

Kiel klarigas raporto de la preparkomitato de la konferenco, en la agado de sovetiaj esperantistoj aperis lastatempe seriozaj mankoj. Nome rondetoj kaj kluboj laboris dise, studlaboro estis nekontentiga, lerniloj ne estis en sufiĉa kvanto, ĉar oni praktike ne eldonadis ilin. Tial SSOD (Unio de amikecaj societoj), VCSPS (sindikatoj) kaj CK VLKSM (komsomolo) subtenis en sia komuna decido akceptita la 27-an de decembro 1978 proponojn pri la kreo de unueca organizo, kiu kunordigus aktivadon de la esperantistoj en USSR. Novaj Esperanto-kluboj povas esti kreitaj, se ili ricevas aŭspicion de uzinaj (fabrikaj) sindikataj komitatoj aŭ de koncernaj komsomolaj komitatoj, se ili havas ejon, lernilojn kaj kvalifikitajn instruistojn.

Neceson eldonadi lernolibrojn, asocian bultenon, beletran revuon kaj literaturajn verkojn substrekis ankaŭ Decido de la fonda konferenco kaj en sia raporto la prezidanto de ASE prof. M. Isaev. Li diris i.a. ke estas preparita por eldono granda kolektiva verko "Problemo de internacia helpa lingvo", en kiu estas eksplikataj pluraj aspektoj de teorio,historio, strukturo kaj instruado de Esperanto.

Pliampleksigo de la organizaj formoj kaj metodoj devas kaŭzi ordigon de la esperantista agado apogita je helpo kaj subteno de SSOD, sindikatoj kaj komsomolo sur diversaj niveloj. (k)

## KRONIKO

■ Oran geedziĝon festis la 2.6. en Lovosice longjaraj esperantistoj Věra S t a n k o v á kaj František S t a n ě k, kiuj konatiĝis en 1926 en EK Praha.

■ Forpasis la 6.5. en Gottwaldov Cecílie P r a c h a ř o v á, aĝa 62 jarojn.


■ Bildoj de Václav Š i m e č e k estas ekspoziciataj en la Muzeo de husana revolucia movado en Tábor,laborejo Soběslav (17.5.-24.6.1979).

■ La redaktoro de STARTO salutas legantojn el ĝia nova restadejo en Budapeŝto, kie li daŭre agadas kiel ĵurnalisto kaj esperantisto.

■

Ankaŭ ĉijare povos tre malmultekoste unu ĝis kvin personoj agrable refreŝiĝi inter junio kaj septembro en du ĉambroj de ĝardena vilao, proksimume 600 m de la fama valbaraĵo Seč ĉe la rivero Chrudimka. Manĝado en proksimaj restoracioj aŭ memstara kuirado en komplete ekipita kuirejo.
skribu al : Ladislav MRÁZEK Gagarinova 378/1o 53oo9 Pardubice.




visa kaj smetol
lahôdkové mliečné margaríny na prípravu chutných koláčov
Maslové, linecké, orieškové a iné cestá ľahko pripravíte s použitím niektorého z lahôdkových mliečnych margarínov.
VISA a SMETOL rovnako výborne vyhovujú na prípravu kysnutého cesta, cestá v prášku ako sú linecké s kokosom, vanilkou a pod.
*konataj laktaj margarinoj


*staj kukoj*
por preparo de bongustaj kukoj

# La verko de Schleyer post 100 jaroj

Antaŭ unu jarcento, en 1879, J. M. Schleyer publikiĝis en poezia revuo la unuan priskribon de sia internacilingva projekto, kiun li nomis VOLAPÜK. En la sekva jaro la unua libroforma volapuka gramatiko aperis en Sigmaringen apud Konstanz, kaj sekvis ĝin germana-volapuka vortaro.

La plej fruaj adeptoj de Volapuko estis germanlingvanoj. Baldaŭ la nova lingvo disvastiĝis en slavaj landoj. La unua ruslingva propagandilo pri Volapuko estis eldonita en Brno en 1884. Tiu kvarpaĝa broŝuro, enhavanta mallongan gramatikon, estis verkita de du balt-germanoj, F. Waldmann kaj A. Slefocht. Laŭ Bibliografio de Internacia Lingvo de Petro E. Stojan, la unua ĉeĥa gazetartikolo pri Volapuko, titolita "Mluvnice světomluvy Volapük" ("Gramatiko de la mondlingvo Volapük"), aperis en Moravské Noviny (Velké Meziříčí) en 1887.

Ŝajnas, ke František Vladimír Lorenc (1872-1957), la unua esperantisto en Ĉeĥoslovakio, estis ankaŭ la unua volapukisto en tiu lando. Li estis nur 15-jara junulo, kiam li lernis Esperanton, kaj tio signifas, ke li proprigis Volapukon al si, kiam li estis eĉ pli juna. Li ankaŭ korespondis kun J.M. Schleyer mem.


Se la historio de la disvastiĝo de Esperanto en Ĉeĥoslovakio ne tro malsimilas la historion de la movado en aliaj europaj landoj, oni povas supozi, ke pluraj esperantistoj de la pionira periodo venis el la vicoj de la volapukistoj, kies movado komencis disfali nur unu jardekon post la lanĉo de la lingvo. F.V. Lorenc estas unu ekzemplo.

Dua eksvolapukisto-esperantisto en Ĉeĥoslovakio estis d-ro Siegfried Lederer (1861-1911). Li estis germano, kiu oficis kiel instruisto pri la latina kaj helena lingvoj en praga gimnazio. Antaŭ 1908 Lederer aliĝis al Esperanto, ĉar en tiu jaro li kunfondis la Esperanto-societon "Verda Stelo" en Prago. Ekde tiu sama jaro, li instruis Esperanton en komerca lernejo en la sama urbo. De 1909 ĝis 1914 li eldonadis en Wolfenbüttel, Germanio, sian antaŭan volapukistan periodaĵon Rund um die Welt kiel Esperantan revuon, kun Albert Schramm kiel ĉefkunlaboranto.

Kvankam la organizita volapuka movado jam delonge sekvis sian ĉefgvidanton en la tombon (Schleyer mortis en 1912), kelkaj adeptoj de Volapuko pluportis la torĉon kaj ankoraŭ hodiaŭ uzas la lingvon - pli-malpli - pro evidente nepraktikaj, sentimentalaj motivoj. Tamen, ilia lingvo ne estas la ortodoksa Volapuko de Schleyer, sed modifita versio ellaborita de d-ro Arie de Jong el Nederlando en la 1930-aj jaroj. Tiu ĉi lingvo certe neniam ricevus la aprobon de la badena prelato, kies movado estis pereigita fare de reformemaj skismuloj.

Ĝis nun mi sukcesis malkovri plenmanon da volapukistoj - ne pli ol dek - en Anglio, Francio, Nederlando kaj Brazilo.





Ili formas specon de skeleta movado, kiu ĉi-jare, okaze de la centjara jubileo de la ŝlejera lingvo, celas direkti atenton al Volapuko, por ke ĝi ne tute formalaperu en forgeso. Se ankoraŭ restas fidela adepto de Volapuko ekzemple en Ĉeĥoslovakio, li estas tute izolita kaj nekonata al aliaj samlingvanoj.

B. Golden (teksto mallongigita)

# Internacia pacmarŝo en Jablonec



Ek al! Dum la starto en Jablonec (meze prezidanto de Distrikta Packonsilio M.Chramosta).

La VII-an internacian pacmarŝon sub aŭspicio de distrikta packonsilantaro organizis la 22-an de aprilo esperantistoj en Jablonec nad Nisou. De la Placo de paco (Mírové náměstí) ekmarŝis pli ol 400 partoprenantoj, esperantistoj el diversaj kluboj de Ĉeĥoslovakio, GDR kaj Pollando, turistoj, pionirgrupoj kaj uzinaj kolektivoj. Kelkaj antaŭ la starto atentigis, ke ili partoprenas jam la sepan fojon. La arango havas jam bonan nerompeblan tradicion. Ĉi-jara marŝo estis samtempe manifestacio okaze de la estrara kunsido de Tutmonda Packonsilantaro en Prago.

Survoje partoprenantoj honorigis memoron de viktimoj de la nazia koncentrejo en Rychnov ĉe Jablonec kaj preterpasis ankaŭ la domon en Frýdštejn, kie estiĝis unu el organizaĵoj de komunista partio en norda Bohemio en majo 1921.

Ĉiuj partoprenantoj estis kontentaj, la vetero favoris. Kune kun plej spertaj turistoj oni tuj decidis, ke la venontjara arango nepre enhavu ankaŭ la marŝon je distanco de 35 km tra malmulte konata regiono sub la monto Ještěd. Honoran premion por la plej multnombra Esperanto-klubo transprenis esperantistoj el la pola Bydgoszcz. Premiojn de Distrikta Packonsilantaro, Esperanto-klubo kaj Kulturcentro Jablonec laŭtradicie ricevis aliaj grandaj kolektivoj, turistoj, junpioniroj, plej junaj kaj plej aĝaj partoprenantoj kaj komprenenble ankaŭ reprezentantoj de eksterlandaj kluboj.

Amikan renkontiĝon ĉe la direktoro de Kulturcentro Jablonec partoprenis prezidanto de Distrikta Packonsilantaro Mirko Chramosta kaj estraranoj ing. Václav Kýnl kaj Miloslav Jíra, estrarano de ĈEA Josef Novák, reprezentantoj de praga EK L. Kynčl kaj J. Šperling kaj gvidantoj de esperantistaj grupoj el Bydgoszcz, Świebodzice kaj Meissen. Oni alte taksis la aktivecon de l esperantistoj en Jablonec, kiuj per diversaj internaciaj arangoj kun najbaraj landoj jam pli ol dek jarojn efike kaj sukcese subtenas la ideon de internacia



amikeco. Siavice oni kun plezuro akceptis memordonacojn(flageto kaj publikaĵoj) de esperantistoj el Bydgoszcz kaj Přerov.

Tre alta rekono de nia laboro estis la vortoj de M. Chramosta, nome ke tiagrada kunlaboro inter packonsilantaro kaj esperantista klubo estas verŝajne tre rara en nia lando kaj ke la dokumentojn pri nia komuna agado oni vidos en ekspozicio okaze de la estrara kunsido de Tutmonda Packonsilantaro en Prago.

M. Jíra

# Vademekum esperantského propagandisty

Každý esperantista ví, že pro propagaci mezinárodního jazyka je nejdůležitější racionální, přesvědčivá, moderní argumentace, jelikož právě v této oblasti je zakořeněno nejvíce předsudků, falešných informací a neznalostí vůbec. Proto jako na zavolanou přichází knížka redaktora STARTA Oldřicha Kníchala "Světadíl bez tlumočníků", která neobyčejně zasvěceně a na úrovni současných poznatků a světové situace probírá v deseti kapitolách ze všech aspektů problém mezinárodního jazyka. Čtenář se doví zajímavé informace o teorii mezinárodního jazyka, o strojovém překládání, o problému tlumočnictví, o dějinách mezinárodního jazyka, o gramatice a struktuře esperanta, o esperantských organizacích, o vztahu socialistického a esperantského hnutí a o mnoha dalších zajímavých problémech týkajících se mezinárodního plánovaného jazyka. I zkušený esperantista se doví mnoho nových aktuálních informací anebo dokáže si zaktualizovat fakta, která se stala již propagandistickým klišé.

Kniha je napsána poutavě, živým jazykem a je srozumitelná různým čtenářským vrstvám; neměla by proto chybět v žádném esperantském kroužku a u žádného aktivního esperantisty, nikoliv však jako okrasa knihovny, nýbrž jako každodenní nástroj k přesvědčování široké veřejnosti o významu a potřebě mezinárodního plánovaného jazyka.

V příštím vydání by bylo vhodné rozšířit odstavec o esperantském hnutí v ČSSR mezi světovými válkami (zmínka jen o brněnském a pražském klubu je příliš stručná) a věnovat několik poznámek bouřlivému rozvoji nové vědy o mezinárodním jazyku - interlingvistice. Vtipná grafická úprava je často znehodnocena seříznutím při vazbě. A konečně obecná bolest esperantských publikací: použití jiné barvy než zelené se považuje zřejmě za svatokrádež. Výsledkem je pak neobyčejná barevná monotonie esperantských knížek, propagačních materiálů, plakátů.

TUB-LAMINATEJOJ
KAJ FERFABRIKOJ
CHOMUTOV

TRADICIO
KVALITO
FIDINDECO



(Oldřich Knichal: Světadíl bez tlumočníků. Deset kapitol o mezinárodním jazyku. Český esperantský svaz, Praha, 1978. 132 stran. Cena 13,-- Kčs. K dostání v sekretariátu ČES, Jilská 10, 110 00 Praha 1.)

Dr. J. Jermář

-o-o-•-o-o-

I když jsem si mohl knihu dosud jen prohlédnout a tu a tam přelétnout kus textu, nabyl jsem hned dojmu, že jde o moderně pojatou a zpracovanou monografii o naléhavé nutnosti nového přístupu k řešení otázky mezinárodního dorozumění cestou zjednodušení komunikace využitím plánovaného jazyka.

(Z dopisu J. Maříka)

## N. Aleksiev 70 jara

Unu el la plej fortaj kaj rimarkindaj figuroj de la bulgara kaj entute de la nuntempa internacia Esperanto-movado. La fama bulgara verkisto akademiano Georgi Karalavov ("La bofilino" aperis 1959 ankaŭ en Esperanto), kiu studis kune kun Nikolĉo Bogdanov, kiel Nikolo Aleksiev nomiĝis kiel studento, iam nomis lin "cizelita ŝtono", ĉar ĉie kapablas majstri la starigitajn taskojn.

Kiel socia aganto li baldaŭ pruviĝis tre kapabla, kunorganizis strikojn, laboris kiel ĵurnalisto, agadis kiel laborista esperantisto en la tempo de la blanka teroro en Bulgario. Pli ol 7 jarojn li pasigis en la karceroj de la faŝisma Bulgario kaj pro lia komunisto agado estis forpelita de la universitato. Inter 1946-1952 ĉefredaktoris la centran organon de la bulgaraj sindikatoj Trud (Laboro). Li estis sekretario de la Centra Konsilantaro de Sindikatoj, vicprezidanto de la Komitato por Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun eksterlando, lastatempe membro de la Tutmonda Packonsilantaro.

N. Aleksiev apartenis al la plej aktivaj esperantistoj de BEA kaj estis de 1964 - 1976 ĝia prezidanto. Kun lia nomo estas intime ligita la evoluo de MEM dum la lastaj 15 jaroj. Al nia ŝatata kaj estimata jubileanto ni deziras elkore ankoraŭ multajn kreivajn jarojn.

(db)

---

HORIZONTO DE SOVETA LITOVIO.

Interesan legaĵon proponas la nova 45paĝa kajero eldonita de Litova societo de amikeco kaj kulturaj rilatoj kun eksterlando (1979). Tiaj estas ekzemple artikoloj pri la kultura vivo en Litovio kaj pri la agado de la tieaj esperantistoj (400 jaroj, Zamenhof kaj Litovio, En Esperanto-Klubo de Kaunas, Trairita vojo k.a.). Krome aperas kelkaj beletraj tradukoj de konataj litovaj verkistoj kiel E.Mieželaitis, V. Dautartas kaj ankaŭ originalaj verkoj de la Esperanto-autoroj.

FABRIKOJ DE MUEL-MAŜINOJ,
nacia entrepreno

PARDUBICE

trusto de la entreprenoj "Chepos"

portanto de la ordeno "Por la meritoj pri la konstruado"
la entrepreno de la 50-a datreveno de KPĈS
laŭreato de la ŝtata premio de Klement Gottwald

PROJEKTAS, FABRIKAS KAJ MUNTAS

- ŝtalajn silojn por greno
- kompletajn ekipaĵojn por la gren-siloj
- kompletajn ekipaĵojn por la nutraĵ-farejoj
- kompletajn ekipaĵojn por la gren-mueliloj
- sekigejojn de greno kaj la pluajn maŝinojn por la postrikolta prilaboro de greno
- produktoliniojn por la grajnigo de la sekigitaj furaĝo, luzerno, pajlo kaj ceteraj nutro-miksaĵoj
- terkulturajn helico-transportilojn por la transportado de la sil-deponita nutraĵo
- bakistajn fornojn kaj pasto-porciilojn

Eksportanto:
TECHNOEXPORT BRATISLAVA,
Jaŝíkova 6

La marko "TMS"
tradicio - majstreco - solideco

EKSPORTANTA ENTREPRENO
KUN LA CENTJARA TRADICIO

# PARDUBICE KAJ TŘNEC JUBILEAS




La 7-an de aprilo 1979 solenis ESPERANTO-KLUBO en KD ROH DUKLA PARDUBICE la 70-an datrevenon. Okaze de ĝi estis aranĝita Renkontiĝo kun pacdefendantoj, kiun partoprenis reprezentantoj de komunista partio, de Distrikta packonsilantaro, de ĈEA, UEA, MEM, ĝemela Esperanto-grupo Berlin-Lichtenberg, de Centra Laborrondo en Berlin kaj de EK en Pirna, GDR.

La renkontiĝon omaĝis versoj de Jiří Kořínek: Sulko longa sepdek jarojn, kiujn interpretis Eva Seemannová (sur la bildo). Post prelego pri historio de la klubo sekvis alparoloj de l gastoj, kies ĉeftemo estis la paco.

Al posttagmeza kulturprogramo kontribuis lernantoj de LŠU, de ZDŠ Studánka, Eva Seemannová kaj operkantisto M. Smyčka.

-o-o-●-o-o-

Antaŭ 45 jaroj estis en Třinec fondita E-klubo, kiel Loka Grupo de Regiona Esperantista Ligo. REL estis fondita tri jarojn pli frue - en 1931; ties centro estis Český Těšín kaj ĝia prezidanto estis unu el la kunfondintoj L. Krysta. En Třinec jam en 1920 okazis E-kurso, kiun gvidis prof. Leopold Kronenberg kaj la finlernintoj dum kelkaj jaroj kunvenadis en Laborista domo en Třinec. E-klubo tiam ankoraŭ ne estis fondita oficiale.

Al sukcesaj atingoj třinecanoj kalkulas en la jaro 1936 organizitan E-kurson, kiun gvidis geedzoj Seppik el Estonio. Ĝin partoprenis pli ol 170 adeptoj.

Antaŭvespere de esperantistaj renkontiĝoj sur monto Čantorio estis en Třinec organizataj vesperoj kun kultura kaj amuza programo, estis arangitaj E-kursoj, aŭtobusaj ekskursoj en- kaj eksterlandaj kun vizitoj al esperantistoj, vojaĝprelegoj kun lumbildoj, ekspozicioj, ktp.

En la lasta tempo oni sukcesis plijunigi la estraron de LG, aliĝis ankaŭ kelkaj gejunuloj. Al plijunugita estraro, kun Karolo Madzia en la frunto oni deziru multajn sukcesojn.

(po)

# RONDETA VIVO

B R N O – Poezia vespero okazinta la 20.3. en prezento de E.Seemannová ravis multnombran ĉeestaron. La artistino recitis el poeziaj verkoj Nia sinjorino Božena Němcová de F.Halas kaj el Kanto pri Viktorka de J.Seifert, ambaŭ en la traduko de J.Kořínek. Valoran kaj altnivelan paroladon pri nacia literaturo en la internacia lingvo prezentis al la klubanaro la 3.4. d-rino M. Šaturová el Bratislava.

F R Ý D E K – M Í S T E K – En kafejo ESPERANTO la 20.5. 1979 en preleg-ciklo "Interesaj profesioj de esperantistoj" – Infanmondo el vidpunkto de psikologo parolis A.Holčáková. Post la parolado sekvis diapozitivoj kaj filmo el la infankongresoj.

P A R D U B I C E – Vesperon de solidareco kun la vjetnama popolo oni arangis la 10-an de majo. Ĉeestis vjetnamaj studentinoj el la urba altlernejo. La prelegg enhavis porpacan ideon laŭ la vortoj de Ho Ĉi Min: " Nenio estas pli valora ol sendependeco kaj libereco". Sekvis diskutado kun la studentinoj pri ilia patrolando. La vjetnamaj gastoj ricevis memordonacojn kaj la gastigantoj petis transdoni sincerajn salutojn de esperantistoj el Pardubice al la vjetnama popolo.

T Á B O R – Esperantista Klubo arangis la 21.5.1979 letervesperon. Venintaj leteroj liveros interesan materialon por informoj kaj ebligos kontaktojn kun eksterlanda samideanaro.

Táborský zpravodaj daŭre publikigas informojn el la movado.

T E P L I C E – Amika renkontiĝo kun germanaj esperantistoj el Freiberg (GDR) okazis la 19an de majo. Oni arangis marŝon, kantis esperantlingve kaj firmigis amikecon. La gastoj pridonacis ĉeĥajn amikojn kaj invitis ilin al sia hejmloko.

Ú S T Í N. / L A B. – ER ĉe ODKP en Ústí nad Labem havas regulajn kunvenojn ĉiuĵaŭde en Domo de Kulturo je la 19a horo en klubejo 112. El arangoj dum la pasinta jara periodo menciindas i.a. la solena programo 29.3.1978 kun prelego de doc.d-ro V. Novobilský, CSc: "Apliko de Esperanto por batalo por paco kaj por la propagando de ĈSSR eksterlande" kun koncerto de arioj kaj kantoj en



TATRÁSKLO

TATRASKLO, trusto de produktantoj de vitro, TRNAVA
FABRIKAS EN JENAJ FABRIKOJ:
Spojené sklárne, n.p. Lednické Rovne
Stredoslovenské sklárne n.p. Poltár
Skloplast, n.p. Trnava
Skloobal, n.p. Nemšová
Výskumný a vývojový ústav sklársky Trenčín

DIVERSSPECAJN KEMIAJN KAJ INDUSTRIAJN KAJ LABORATORIAJN VITROJN, VITROTUBOJN, VITRAJN FADENOJN, VITROŠTOFOJN KAJ PLUAJN PRODUKTOJN.

NI EKSPORTAS EN 57 LANDOJ DE LA MONDO PERE DE:
OZO Škloexport
PZO Čsl.Keramika
PZO Merkuria
PZO Jablonex
PZO Tuzex
PZO Transakta

## SANDRIK DOLNÉ HÁMRE N.P.
## NOSITEĽ RADU PRÁCE
## HODRUŠA-HÁMRE



SANDRIK VYRÁBA OCEĽOVÉ KANISTRE NA POHONNÉ HMOTY O OBSAHU 10 A 20 L A VYLIEVACIE NÁDSTAVCE NA KANISTRE V PEVNOM I OHYBNOM PREVEDENÍ. POLOVICA ROČNEJ PRODUKCIE KANISTROV JE URČENÁ NA EXPORT TAKMER DO CELÉHO SVETA.
STAŇTE SA I VY OBCHODNÝMI PARTNERAMI SANDRIKU - PODNIKU S DLHOROČNOU TRADÍCIOU.

SANDRIK FABRIKAS ŜTALAJN KANISTROJN POR BRULAĴOJ, LA VOLUMENOJ 10 KAJ 20 L, KAJ LA VERŜ-AKCESORAJOJN AL LA KANISTROJ, KAJ NEFLEKSEBLAJN KAJ FLEKSEBLAJN, LA DUONO DE LA JARA PRODUKTOKVANTO DE LA KANISTROJ ESTAS DESTINITA POR LA EKSPORTO PRESKAŬ EN LA TUTAN MONDON.
ANKAŬ VI KOMERCE EKRILATU KUN SANDRIK - KUN LA ENTREPRENO DE LONGJARA TRADICIO.



LA TROTILO POR LA PLEJ JUNAJ KONKURSANTOJ - K 6501
LA DETALKOMERCA PREZO: 145,- KČS

Fabrikoj por infanaj veturiloj, nacia entrepreno, Mělník-fabriko DUCHCOV produktas trotilojn, infanajn, pupkaleŝetojn kaj infanajn pedalajn aŭtomobiletojn.
75 jaroj de tradicio garantias la kvaliton.

**SEMPRA**
**KROMĚŘÍŽ**

Malfermita letero al ĉiuj ĝarden-ŝatantoj, florkultivantoj kaj florŝatantoj

Estimataj geamikoj!

Ni invitas vin kore al la venda ekspozicio de la ornama hortikulturo "F L O R I A 79", arangôta fare de SEMPRA, o.p., Praha, la filio por la ĝardenistaj servoj en Kroměříž en la arealo de la kastela parko en Věžky ĉe Kroměříž ekde la 4-a ĝis la 26-a de aŭgusto 1979.

La ekspozicio estos alirebla ĉiutage de la 9.00 ĝis 17.00 h, la enirpago 5,- Kčs.

En la ekspozicio ni ofertos al vi la larĝan sortimenton de: ornamarbustoj, koniferoj, plantoj por ĝardenreketoj, perenoj, ĉambro-plantoj, ornam-herboj, erikejaj plantoj, diversaj bezonaĵoj por ĝarden-ŝatantoj, eĉ la novaĵoj en la sortimento - ekz. sunlum-kolektiloj k. a.

La vendado ankaŭ ĉi-jare realiĝados per la libera elektro de plantoj en la tuta ekspoziciejo.

Al la pograndaj aĉetontoj ni proponas la eblecon de liver - kontraktoj.

La restadon en la ekspoziciejo pliagrabligos al vi diversaj kulturprogramoj.

La refreŝiĝo estos akirebla en la arealo de la ekspoziciejo.

Pli detalaj informoj pri la ekspozicio prezentotaj en la gvid - kajero, kiun vi ricevos senpage ĉe la ekspoziciejaj kasoj.

Ne forgesu viziti ankaŭ la konstantan vendan ekspozicion de floroj kaj bezonaĵoj por ĝarden-ŝatantoj en la vedro-centro "FLORACENTRUM" en Kroměříž, Tovačovského ul., ĉe la ponto de K.Rajnoch. Ĉi-tiu konstanta ekspozicio estas parto de la ekspozicieja arealo.

Ni ĝojatendas vian viziton

SEMPRA Kroměříž

Atentigu afable pri nia ekspozicio ankaŭ viajn amikojn kaj konatulojn.


TUTJARA OLEO POR MOTORO


# MADIT SUPER

## VISKOSTATIK

plej alta kvalito kun konstanta efiko de gudro

SAE 10W/40






BONAJ AĈETOJ EN "PRIOR", PRAGAJ MAGAZENOJ

- multnombraj servoj al la klientaro
- malfermite ankaŭ sabate
- vendado je ĝirĉekoj kaj ĉiuspecaj pruntoj
- mempriservejoj kaj libera elektado de varoj
- parko por personaj aŭtomobiloj en la magazeno KOTVA

Pražské obchodní domy
PRIOR


Kotva
Máj
Bílá labuť
Letná
Dětský dům

la razadon
per la elektra razilo
pliagrabligos kaj plifaciligos

Lavandon
ELECTRIC

REKTIGOS LA BARBOHAROJN
KAJ EBLIGOS PERFEKTAN RAZOSENBARBIGON.
MOLIGOS LA HAŬTON,
REFREŜIGOS ĜIN PER MENTOLO
KAJ PARFUMOS PER LA LAVENDA BONODORO.

LAVANDON ELECTRIC
ESTAS ANKAŬ POR VI





Esperanto sub gvido de M. Smyčka, recitvespero de Eva Seemannová el poezitradukoj de J. Kořínek. En la nord-bohemia ĵurnalo Průboj aperis pluraj artikoloj pri E-disaŭdigoj el Moskvo kaj pri E-o en servoj de paco de J. Kořínek, Varna 1978 de O. Antoš kaj aliaj. J. Kořínek liveris tradukojn de ĉ. 175 poemoj el pluraj poemaroj de poeto J.Karen, de kelkaj poemoj de J.Wolker kaj de pluraj kantoj por uzoj de E-kluboj. V.Novobilský kaj J. Kořínek kompilas, kompletigas kaj retajpas novan trusisteman kartotekon de tradukoj el ĉeĥa kaj slovaka literaturoj. Ĝi superis jam multe 1 000 kartojn. En faka literaturo: aperis de ing.R.Rychlý, CSc, "Novaj trovaĵoj de mineraloj en Norda Bohemio"; referaĵo por la teknika konferenco en Žilina.

Doc.V.Novobilský aperigis en Almanako de la Pedagogia fakultato en Ústí n.L. sur p. 5 - 23 traktaĵon "Informadiko kaj problemo de unueca planlingvo en la periodo de scienctekniko revolucio".

Z N O J M O - "Vesperon de Esperanto" kun bildkartoj el la tuta mondo kaj kulturan vesperon partoprenis multaj esperantistoj kaj junaj esperantistoj.

## KONTRAŬ PRESKOBOLDOJ

Nia leganto W. Hebda prave atentigas pri pluraj preseraroj en STARTO, precipe sur reklampaĝoj. Nepre ili estas limigendaj je minimumo. Sed oni bv. prikonsideri ankaŭ jenon: manuskriptoj, kiuj atingas nin, plejparte ignoras elementajn regulojn de la Esperanta gramatiko aŭ ili estas ofte senmotive skribitaj ĉeĥe (ekz. por la rubriko Rondeta vivo/. Ĉu la sendintoj konscias, ke tiam necesas refari, plibonigi aŭ eĉ traduki ilin aŭ almenaŭ korekti por ankoraŭ neta tajpado, kio plialtigas riskon de pres- kaj aliaj eraroj? Resume do - oni komencu ĉe la komenco kaj klopodu eviti tiajn erarojn jam kompilante informojn aŭ artikoletojn!

(r)

## PRI HUNGARA KONSILIA RESPUBLIKO



La prelegintoj en Svitavy (meze) kun repr. de Laborula klubo O. Kaleka (maldekstre) kaj J. Kareš

P R A G O - VESPERON PRI LA HUNGARA KONSILIA RESPUBLIKO, kies 60jaran datrevenon oni rememoras en tiuj ĉi monatoj, aranĝis la 17an de majo Ĉeĥa Esperanto-Asocio kunlabore kun Hungara Kulturcentro en Prago. Kvindeko da ĉeestintoj aŭskultis la programon el aŭtentikaj tekstoj kaj bildoj, kiun prezentis P.Rados, M.Kovács kaj T. Somogyi el Budapeŝto. La programon en majo spektis ankaŭ la esperantistoj en Cheb, České Budějovice, Svitavy kaj Ostrava.

# internacia panoramo

A F R I K O - En Afriko milionoj da homoj suferas pro gravaj okulmalsanoj,kaj 75 % da homoj estus kuraceblaj per preventa kuracmetodo au tuja helpo. Esperantistoj el pluraj europaj landoj jam kolektis la necesajn sumojn por plena ekipo de du veturklinikoj, ankaŭ kun kuracistoj, asistantoj kaj flegistinoj por Kenjo kaj Malavio. Tiel oni savas la vidkapablon al dekmiloj ĉiujare. Nun denove ili kolektas monon por la tria oftalmologia veturkliniko kaj samtempe por la kvara por Kamerunio. Sur ĉiu veturkliniko estas surskribo: Oftalmologia kliniko de D-ro L. L. Zamenhof.

B U L G A R I O - Prezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio H. Gorov estis eminentigita de Todor Živkov per alta ordeno de Georgi Dimitrov, pro siaj aktivecoj sur kampoj socia kaj esperantista.

Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O - En la nova horaro de Ĉs. fervojoj valida ekde la 27.5.n.j. kaj eldonita de Federacia Trafik-Ministerio, klarigoj estas cititaj en Esperanto. Horaroj de Hungario, Danlando kaj Italio ankaŭ aperigas klarigojn jam dum pluraj jaroj en la internacia lingvo.

P O L L A N D O - Konferenco pri kulturo sub aŭspicioj de Universala Esperanto-Asocio okazis ekde la 20-a de majo gis la 3-a de junio 1979. Ekde la 20. - 26. de majo la IV-a Ĉebalta Esperanto-Printempo Koszalin-Mielno. Ekde la 27. - 30. de majo "Gdanskaj proponoj", Gdansk.

La 18.3.1979 la Pola Televido okazigis tuthoran programon pri praktika apliko de Esperanto. Parolis pluraj eminentaj aktivuloj de la movado, redaktoroj, aktoroj, verkistoj.

S A N M A R I N O - Ĝenerala direktoro de UNESKO s-ro A. M. M'Bow vizitis en decembro 1978 respublikon Sanmarino okaze de la 30-a datreveno de Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj. Sur la limo bonvenigis lin grupo da junaj esperantistoj, kiuj salutis lin en la internacia lingvo. En la registara palaco okaze de la oficiala ceremonio Esperanta junularo kantis sub gvido de profesorino M. Michelotti la Esperon por emfazi la internaciecon de la soleno. Fine la generala direktoro gratulis la ĉeestantojn pro la meritoj.

O R N I T O L O G I O - Ornitologia Esperanto-Rondeto asociiĝas kelkcent sciencistojn kaj interesatojn el 29 landoj, kiuj okupiĝas pri la vivo de birdoj, ilia protekto antaŭ minaco de l' civilizo kaj volas ĉesigi ilian pereigadon ĉefe dum tempo de migrado. Aperis ankaŭ speciala ornitologia vortaro.

R A D I O - En la jaro 1978 okazis 2 788 regulaj radiodisaŭdigoj en la Internacia lingvo pere de 15 radio-stacioj. La disaŭdigoj entute daŭris 1 018 horojn. En 1977 okazis 2 523 disaŭdigoj de 14 radiostacioj en daŭro de 947 horoj.



# z činnosti komise mládeže

## ESPERANTSKÁ OLYMPIÁDA DO NOVÉHO KOLA

V Okresním domě pionýrů a mládeže v Opavě se ve dnech 7. - 8. dubna 1979 konal jarní seminář mládeže, kterého se zúčastnilo více než 30 lidí. Účastníci byli seznámeni s historií myšlenky mezinárodního jazyka, se strukturou svazových orgánů, se zásadami vyučování esperanta, s mírovou prací čs. esperantistů a s činností zkušební komise. Se zájmem se setkaly i přednášky o esperantu ve filatelii, o esperantských křížovkách a esperantské olympiadě. Kulturní program byl vyplněn večerem vzpomínek na Járu da Cimrmana a návštěvou Památníku P. Bezruče.

Letos na podzim bude zahájen tříletý cyklus šesti seminářů zakončených zkouškami. Semináře budou na sebe námětově navazovat. Zúčastnit se mohou pouze ti mladí aktivisté, které jejich místní skupiny předem přihlásí na celý cyklus.

Komise má k dispozici asi dvacet adres gruzínských mládežníků ve věku 17 - 26 let, kteří si chtějí dopisovat s naší mládeží. Adresy žádejte u P. Deáka, Máchova 4, 415 01 Teplice v Čechách.

Ve STARTU 3/78 bylo vyhlášeno 1. kolo Esperantské olympi-



TRANSPORTA

nacia entrepreno, Chrudim

projektas, produktas kaj muntas
ekipaĵojn por longdistanca
bendtransporto en enteraj
minejoj
ekipaĵojn por deponeja mastrumado
plue ĝi elfaras levĉarojn kun flanka ŝarĝeblo de portkapablo 5t kaj 6,3t kaj devirsspecajn pesilojn

ády 1978. Zúčastnilo se ho jedenáct soutěžících. Všichni splnili podmínky soutěže a postupují do dalšího kola. Jsou to: D. Berndt z Berlína, I. Drbohlavová z Turnova, J. Duda z Olomouce, L. Filipová z Chropyně, J. Hrbek z Nové Vsi, H. Jánová z Českých Budějovic, E. Jelínková Z Třebíče, F. Kloučková z Mělníka, Ing. J. Mastný z České Lípy, J. Riedl z Hradce Králové a J. Tomíček z Říkovic. Všichni účastníci dostali diplom za absolvování 1. kola a budou zapsáni do Kroniky komise mládeže ČES. Úkoly druhého kola dostanou na svoji adresu, protože pouze oni se mohou tohoto kola zúčastnit. Pro ostatní zájemce vyhlašuje komise mládeže nové 1. kolo:

Úkol č. 1: Vyberte jednu slovotvornou předponu, vytvořte s její pomocí 10 slov od různých slovních kmenů a užijte je ve větách.

Úkol č. 2: Napište esperantsky o své nejoblíbenější knize nebo filmu.

Pište pokud možno strojem na formát A4 a neopomeňte uvést svou adresu, rok narození a toto písemné prohlášení:

"Přihlašuji se do 1. kola Esperantské olympiády 1979 a prohlašuji na svou čest, že jsem úkoly odnikud a od nikoho neopsal, nýbrž jsem je vypracoval sám bez cizí pomoci.

V ............., dne ..........1979. Podpis

Úkoly odešlete co nejdříve na adresu: M. Malovec, Slovákova ul.9, 602 00 Brno.



Karel Navrátil:

## ONI NE PLU KAPTOS MIN

Ĝi sukcesis! Kun lastaj restoj de forto mi kuratingis la tramon kaj per kubutoj sukcesis ankoraŭ malfermi la premegantajn pincilojn de pordo. Kline mi suriris ŝtupareton, disciplinite mi tenis min ĉe stango kaj atendis, ĝis mia koro refalos el gorĝo en la lokon, kie ĝin kuracistoj pleje ŝatas vidi. En tiu momento mi ekvidis ŝin. Ŝi staris kelkajn paŝojn de mi, sed ne tiom malproksime ke mi ne povu vidi ĉion, kio estis reklamata. Sufiĉe estis da tio kaj ĉio kun etikedo de la plej alta kvalito.

Mi spiregas pene sed malgraŭ tio ŝveligas mian bruston kaj enŝovas mian ventron. Ŝajnis al mi, ke ŝi observas min. Sendube mi vekis ŝian intereson pro mia valorega sportfaro. Certe, kiam mi dece laŭorde ekkuregas, vere mi havas ankoraŭ rapidecon. Plezuro por okuloj. Ŝi eĉ ridetas.

Ĉu eble je mi ...? Por esti certa, mi rerigardis ĉu ŝia simpatio hazarde ne apartenas al iu alia. Malantaŭ mi iu avino legas la gazeton "Stadion" kaj sur la malantaŭa platformo petolis du stratbuboj. Jes, la mondo estas tamen bela! Vere, valoris kuregi precize al tiu-ĉi tramo.

Ŝiaj okuloj, haroj, tute ĉio ...! La transportilo pasas tra stratoj kaj miaj pensoj vagas, kiu-scias-kie...

Ŝi proksimiĝis al mi. Diversaĵojn mi jam aŭdis pri la emancipado. Kaj la hodiaŭaj knabinoj? Ili estas modernaj kaj sen antaŭjuĝoj. Resume kaj sendube ŝin interesas mi. Post tiu ĉi konstato la mondo ekturniĝis kun mi.

"Bonan tagon!" ŝi alparolis min. "Nováček mia nomo, ĝoje por mi", eligis el mi kvazaŭ preparite. "Revizio de veturbiletoj!" ... Elpafis ŝi dure kaj ŝiaj buŝanguloj malleviĝis. Ankaŭ la okuloj perdis sian antaŭan afablan esprimon. "Dio mia!" Mi staras kvazaŭ stultulo antaŭ bilettruigilo kaj en la mano mi premaĉas virge sendifektan bileton.

"Sed mi ... mi ..." balbutas mi konfuze surprizita de la evoluo de okazaĵo. "Mi forgesis ..." senkulpiĝas mi laŭvere, ĉar fakte mi ne kutimas vojaĝi senpage.

"Tio kostas kvindek kronojn" diris ŝi per tono, kiu donis nenian esperon al mi. Mi pagis punmonon kaj tuj sur la proksima stacio mi eltramiĝis ruinigita. Mi paŝas piede tra la stratoj kaj survoje mi renkontadas multe da knabinoj. Ili estas belaj, belaj iliaj haroj, okuloj, entute ĉio ...! Ho! Jam ne! Min ili neniam plu kaptos!!!

Esperantigis d-ro B. Novotný

# [recenzo]

INFORMADIKO KAJ LA PROBLEMO PRI INTERNACIA PLANLINGVO EN LA ETAPO DE SCIENCTEKNIKA REVOLUCIO estas la titolo de ĉeĥlingva traktato, verkita de D-ro Vlastimil Novobilský, CSc., docento ĉe Pedagogia Fakultato. Publikigita sur 19 paĝoj de Sborník Pedagogické fakulty v Ústí nad Labem, 1979, řada chemická, eld. Ŝtata Pedagogia Eldonejo, Praha 1979.

La aŭtoro pritraktas, laŭ scienca maniero, la tre aktualan, ofte eĉ kapturnan problemon de senĉese kreskanta kvantego da sciencaj informoj diverslingvaj en la epoko de sciencteknika revolucio ("informada eksplodo") kaj pluajn problemojn: scienca traktado de la informado (informadiko), multlingveco, solvado de la multlingveco, konsekvencoj de enkonduko de internacia planlingvo, la nuna stato de planlingvoj. La verkon fermas listo de aplikita literaturo (22 pecoj) kaj resumoj en la rusa kaj angla lingvoj.

La aŭtoro celis, ke lia faktoriĉa artikolserio ludu certan rolon en la medioj, precipe scienca kaj edukista, kie la generala informado pri la internacia lingvo estas preskaŭ nula. Oni povas substreki, ke li plenumis tion en maniero, inda je nun jam renomita sciencisto kaj, cetere, konvinkita interlingvano. En la libro estas pluaj kvar traktatoj de Novobilský pri fakaj problemoj de la ĥemio. – La scienca almanako estas distribuata al pedagogiaj fakultatoj, iuj lernejoj, ktp. Sole tre limigita kvanto estas rezervita por pluaj interesatoj. Mendebla, kontraŭ 15,50 Kčs, ĉe: Katedra chemie Pedagogické fakulty v Ústí nad Labem, Čs.mládeže 8, 400 96 Ústí nad Labem. (jm)

## Turismaj ekskursoj

Kunlabore kun Pola Esperanto-Asocio ni preparis por vi kelke da turismaj ekskursoj al interesaj aranĝoj en Pollando. Temas pri sendevizaj interŝanĝoj de unuopuloj kaj grupoj. Aliĝu laŭ la elektita termino kaj ni garantios vian partoprenon. Vojaĝkostojn vi pagos mem laŭ via elekto, restadelspezojn al la asocia konto. En tiu ĉi sumo vi havas pagitajn tranoktojn en hotelo kun trifoja manĝaĵo, partopreno en kultur-turismaj aranĝoj kaj aliajn servojn laŭ la karaktero de la ekskurso.

Rimarkigo "kun ĉevaloj" signifas eblecon partopreni la instruadon pri rajtado sur ĉevaloj teorie kaj praktike sub la gvido de spertuloj. Duonon da sumo vi sendu tuj kun la aliĝilo, la reston vi devas pagi minimume 30 tagojn antaŭ komenco de la ekskurso. Vojaĝbiletojn la asocio ne prizorgas.

| Dato de ekskurso: | L o k o : | Nomo de ekskurso: | Prezo en Kčs: |
|---|---|---|---|
| 01.07. - 08.07. | Bydgoszcz | E-Feriado (kun ĉevaloj) | 710,-- / 1.270,-- |
| 08.07. - 15.07. | Bydgoszcz | E-Feriado (kun ĉevaloj) | 710,-- / 1.270,-- |
| 15.07. - 22.07. | Bydgoszcz | E-Feriado (kun ĉevaloj) | 710,-- / 1.270,-- |
| 31.07. - 13.08. | Wladislawowo | Somera E-Lernejo | 1.700,-- |
| 13.08. - 26.08. | Wladislawowo | Somera E-Lernejo | 1.700,-- |
| 03.09. - 16.09. | Miedzygorze | XV.Int. E-Feriado | 1.980,-- |
| 26.11. - 02.12. | Warszawa<br>Bydgoszcz | XX.Kongreso de PEA kaj<br>V.Int.Foiro de E-Turismo | 1.130,-- |

La prezo por ekskurso "kun ĉevaloj" estas 1.270,- Kčs, sen instruado pri rajtado nur 710,-- Kčs. Per via partopreno kaj aliĝo ĉe ni, vi ebligos, ke ankaŭ la polaj esperantistoj povus partopreni niajn aranĝojn!

## Ora pola aŭtuno 15-foje

Inter la 2-a kaj 15-a de septembro okazos en montara ripozloko Miedzygorze la 15-a jubilea Internacia Esperantista Feriado "La Ora Pola Aŭtuno", unu el la plej popularaj en la mondo. Sume en la jaroj 1965 - 1975 partoprenis ĝin 3 780 esperantistoj el 26 landoj. Organizantoj estas sindikata feria entrepreno FWP kaj PEA. Enkadre de la feriado okazos Internaciaj kursoj de Esperanto, Esperantologia seminario, Internacia Ŝakturniro, Borso de Esp.Insignoj k.a. Partoprenantoj loĝos en ripozdomoj "Hanka" kaj "Gigant" en ĉambroj po 2, 3 kaj 4 personoj. Ĉi jare estas akcepteblaj nur 320 geesperantistoj.

## Porvjetnama helpo

Al nia alvoko en Starto (1/79) pri la porvjetnama helpo venis jena reeĥo:

Geamikoj,

jen mia ĉeko je $ 30,00. Tio estas mia respondo en la gazeto S T A R T O, kiu petas kajerojn, desegnopaperon, farbojn kaj ludilojn. Mi esperas ke per la mono vi povos aĉeti taŭgajn lernilojn.

Salutas vin

R. Kent Jones,
ESPERANTA LINGVA
SERVA KOMPANIO.

15-an de majo 1979

## Gazetara spegulo

En la gazeto Svět v obrazech (16/1979) ĵurnalisto J. Novotný rememoris sub la titolo "Osudné datum" la aktivegan litovan esperantiston Ljudas Alseika. Okdekjaran trafis lin en Siberio mortiga akcidento dum lia bicikla vojaĝo Klajpeda - Vladivostok (12 000 km).

(jm)

—

Peresperanta traduko de la vjetnama novelo de Anh Duc ("Filo") aperis en la sabata aldono de Práce la 12. 5.79. Elesperantigis O. Knichal.

Miloj da aĵoj por ĉiu tago

PRAGO UNION

trust podniků strojírenského spotřebního zboží Praha

KORESPONDI
DEZIRAS

Per ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kĉs aŭ 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turniĝu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

20 gekursanoj 19-35 jaraj - Jozsi Jolanda, Patinoar 12, ap. 3, 4100 Miercurea-Ciuc, Rumanio • Tokos Árpád, 22j., Miercurea - Ciuc 4100, Scurta 29, bloc 7, ap. 50, Harghita, Rumanio • Vlasta Horáková, dir. de la baza lernejo, Gottwaldovy sady 7/51, 018 51 Nová Dubnica, ČSSR • Alena Jeníčková, 20j., Obora 133, Kaznějov 331 51, ČSSR • Adresŝango: inĝ. Zdeněk Pluhař, Holovousy v Podkrkonoší č. 109, 507 51, ČSSR • F. Erdös, 4112 Tusnad-sat 95, dep. Harghita, Rumanio • Bk kun folkloraj kostumoj interŝanĝos V. Rotrekl, 669 02 Znojmo-Dobšice 297, ČSSR • Svedo, oficisto 60jara kun esperantistinoj pri ĉiuj temoj - J. Vedevik, poste restante, 40101 Göteborg I. • A. Bobkiewicz, 20j. studento, 50-139 Wroclaw, str. Szewska 63m. 2. • Szocs Imre, Nicolesti-Ciuc - 4.124 Str. Bot Nr. 262, Jud. Harghita, Rumanio.

## Dary svazu

EK Svitavy 19,-- Kčs



Nia bildo registris momenton el Esperanto-ekzamenoj en la lerneja klubejo ZDŠ Lindnerova strato, Prago, la 19-an de majo. Maldekstre E. Urbanová, dekstre K. Franc, membroj de la ekzamena komisiono.

## INFORMOJ DE SEKRETARIO

PLI MULTNOBRA ASOCIO KAPABLAS PLI ■

Laŭ la statistiko la 1.6.1979 havis nia asocio sume 2.456 membrojn - el tiuj ĉi lau mambrokategorioj:

| | | |
|---|---|---|
| "A" | - kun salajro pli ol 1.100,- Kĉs | 1.192 membroj |
| "B" | - studentoj aŭ kun salajro sub 1.100,- Kĉs | 593 membroj |
| "C" | - subtenantoj de asocio | 15 membroj |
| "D" | - familianoj | 213 membroj |
| "E" | - amikoj de Esperanto | 320 membroj |
| "F" | - dumvivaj | 123 membroj |

La asocio nun direktas 63 filiojn (lokajn grupojn) kaj havas krome 291 tn. rektajn membrojn.

Ĉu ni atingos ĉijare 2.500 membrojn? Ankoraŭ ne pagis jarkotizon 192 membroj el 1978! Tamen oni povas diri ke nia asocio malrapide, sed konstante grandiĝas. Helpu ankaŭ vi! Pli multnombra asocio kapablas pli! En viaj manoj kaj laboro estas nia komuna sukceso.

Kiu ĝis nun ne plenumis sian moralan taskon pagi asocian membrokotizon, ricevos tiun ĉi numeron de STARTO kun postpagilo. Dependas nur de li, ĉu ankoraŭ resti niaj membroj!

ASOCIA ESTRARO ■

kunvenis la 2.6.1979. Estis traktataj diversaj problemoj pri disvastigo de nia movado. I.a. la estraro decidis finance subteni Someran Esperanto-Tendaron en Lanĉov per sumo 35.000,- Kĉs, uzotaj por plibonigo de loĝado, aĉeto de novaj kabanoj, ktp. Se la financa situacio de nia asocio ne malpliboniĝos, verŝajne dum nelonga tempo ni sukcesos el S E T Lanĉov konstrui moderan centron de instruado, turistiko kaj ripozo.

Unuopaj estraranoj informis pri plenumo de akceptitaj taskoj. La nova sistemo de kunlaboro videble jam nun portas fruktojn.

Dum la lastaj monatoj nia asocio kunlabore kun niaj filioj eldonis jenajn novaĵojn:

ABC de Esperanto - lernolibro kompilita de T.Kilian (ĉefo por SET), 808 plejuzataj vortoj en Esperanto (T.Kilian), Unua kajero de sudbohemiaj manĝoj (supoj) kaj Medicinista insigno (trikolora en trapeza formo).

Ĉio mendebla ĉe nia asocio. Prezoj tre moderaj.

NIA KARAVANO AL 64. UK EN LUCERNO ■

forveturos per buso el Prago la 26.7.1979. La vojo gvidas tra FRG. La kongresa urbo estos atingota 27.7. vespere. El Svislando buso veturos tra Aŭstrio, kie oni vizitos Internacian muzeon de Esperanto en Vieno. Oni kalkulas,ke krom dudekmembra karavano la UK partoprenos ankoraŭ 15 aliaj geesperantistoj el ĈSSR.

INTERESITOJ PRI BONA SALAJRO ■

kiuj volas samtempe helpi nian movadon, akceptu bone pagitan kromlaboron kiel asociaj oficistoj por propagando. Via tasko: klarigi al fabrikoj, uzinoj, entreprenoj, hoteloj,ktp. eblecon mendi reklamojn en STARTO. Por ĉiu mendita reklamo oni ricevos fiksan salajron. Helpu ankaŭ geesperantistoj.Ĝis nun preskaŭ ĉiujn reklamojn sukcesis mendi nur neesperantistoj! Ni akceptas ankaŭ reklamojn el eksterlando!

RADIO ZAGREB APLAŬDAS AL STARTO ■

Laŭ letero de s-ino Lapenna, redaktorino de E-elsendado



VÝCHODOČESKÉ CHEMICKÉ ZÁVODY

Synthesia

NÁRODNÍ PODNIK PARDUBICE-SEMTÍN

Fundamentaj organikaj ĥemiaĵoj-organikaj duonproduktoj -organikaj tinkturoj-tekstilaj helpaj preparaĵoj-farmaciaj ĥemiaĵoj-neorganikaj ĥemiaĵoj - teĥnikaj gasoj-industriaj-sterkaĵoj kaj agroĥemiaĵoj-eksplodaĵoj-plastoj en platoj,filmoj kaj folioj -varmoformeblaj kaj premformeblaj plastoj-sintezaj gluaĵoj-rezinoj kaj mastikoj-specialaj lakoj kaj ĉipsoj--silikonaj produktoj --preparaĵoj por la surfacaj alĝustigoj-preparaĵoj por la varma prilaboro de metaloj-specialaj preparaĵoj-puraj ĥemiaĵoj.

10.000 dungistoj-1.300 produktoj - exportado en 80 landojn.

Fonditaj: Semtín 1921, Kolín 1871

La eksporton peras: Chemapol,a.k.,Prago--export, PZO.

de Radio Zagreb, estas nia STARTO bone redaktita kaj ankaŭ reklamoj estas en bona harmonio kun la tekstoj.

ESPERO KATOLIKA KONSTANTE PROVOKAS ■

pere de artikoloj pri Ĉeĥoslovakio. Oni forgesas, ke tiamaniere apenaŭ estus troveblaj simpatioj en nia lando. Ankaŭ s-ano Berka el Vsetín en sia letero al nia asocio tute klare rifuzis informojn en Espero Katolika skribante, ke represitaj dokumentoj pri ĉesigo de la sekcio KELI estis misuzitaj - li neniam permesis ilin publikigi. Oni povas diri, ke tio estas rekta enmiksiĝo en internajn aferojn de nia ŝtato kaj de la asocio. Ĉu Espero Katolika tiamaniere volas plenumi Finan akton el Helsinki? Ĉu ankaŭ por Espero Katolika estas plejuzata slogano: Ju pli malbone des pli bone? Malgraŭ tio, ke Espero Katolika havas intereson havi peranton en nia lando kaj oficiale disvastigi la gazeton!

PROPAGANDCELE ESTOS ELDONITAJ ALUMETSKATOLETOJ ■

fine de 1979 kun esperantaj motivoj. ĈEA pagis al presejo por 1,000.000 skatoletoj. Krome kolektantoj povos mendi nur proprajn etikedojn por tiuj ĉi alumetskatoloj. Sur ili estos reklamita koresponda kurso de Esperanto en la ĉeĥa lingvo.

PANORAMO - KULTURA ALMANAKO MALFRUIĜAS ■

Pro grandaj obstakloj en nia presejo malfruiĝas eldono de PANORAMO. Ni petas pardonon.

TRIJARA SEMINARIO POR FUNKCIULOJ ■

Ĉeĥa Esperanto-Asocio preparas trijaran seminarion por estontaj funkciuloj. Ĉiuj interesitoj ne pli aĝaj ol 35 jaroj aliĝu tuj al ĈEA aŭ ties Junulara Komisiono. Elspezoj de ĉiu seminariano estos kompensitaj kondiĉe, ke estos elektota kaj sukcese ekzameniĝos. Por la elektitaj membroj ĈEA preparos tre valorajn prelegojn; al ĉiuj frekventintoj estos atribuitaj iuj postenoj en ĈEA. Aliĝu nur seriozaj interesitoj. La unua seminario estos aŭtune. Pojare oni organizos du seminariojn.

PAGOTAJ INSTRUISTOJ DE ĈEA ■

Ĉiu, kiu intencas estonte instrui kiel pagota instruisto de ĈEA devas sukcese fini asociajn ekzamenojn. Ni atentigas, ke la asocio preferas kunlaboros ekde 1980 kun la jam ekzamenitaj. Aliĝu do ĉe Ekzamena komisiono.

MALFERMITA LETERO AL REDAKTORINO DE "PERSPEKTIVO" ■

Venis unuaj eĥoj je malfermita letero al redaktorinó de Perspektivo. Permesu represi parton de unu el ili:



Slovakia



**Obchodný podnik Slovenského zväzu výrobných družstiev**
BRATISLAVA, KOŠICKÁ UL. Č. 45
TELEFÓN: 697-57, 623-34, 697-56, 690-50, 697-58

"Mi gratulas al STARTO 2/79 - ĝi tre al mi plaĉis, ĉefe artikolo de d-ro J. Jermář - verŝajne nenie alie ni reagu al artikoloj en Perspektivo, al ilia filozofio kaj atakado de nia sistemo per de mokado" ...

J. Vítek (estinta prezidanto de ČEA).

POR LA KURANTA JARO ■

vi povas aboni ĉe nia asocio ankoraŭ jenajn gazetojn:

| | | |
|---|---|---|
| PACO kun suplementoj | jarabono | 30,-- Kčs |
| JUNA AMIKO | jarabono | 15,-- Kčs |
| DER ESPERANTIST | jarabono | 12,-- Kčs |

■ RECEPTARO DE ELEKTITAJ SUDBOHEMIAJ MANĜAĴOJ - SUPOJ

estas titolo de la unua kajero pri la konataj ĉeĥaj regionaj manĝaĵoj. La receptoj estas simplaj, manĝaĵon eblas prepari en ĉiu lando.

Interesa enhavo, belega grafiko, dukolora preso estos certe tauga donaco por viaj eksterlandaj geamikoj. Ne atendu longe, la stoko ne estas granda.

Eldonis Filio de ČEA en České Budějovice. Formato A4, 18 paĝojn. Kompilis ing. Papírníková. Lingva kontrolo V. Echtner. Ilustris d-ro V.Morava. Prezo 5,- Kĉs aŭ 2 irpk, prezo en irpk inkluzivas poŝtelspezojn.

■ MEDICINISTA INSIGNO

estas ankaŭ mendebla ĉe nia asocio. Tre belaspekta, trikolora insigno por ĉiuj medicinistoj havas trapezan formon. Prezo 9,- Kĉs aŭ 4 irpk (prezo en irpk inkluzivas poŝtelspezon de registrita sendaĵo).

Ambaŭ novaĵoj mendeblaj ĉe niaj perantoj.

S A N O ■

MEDICINISTAJ INFORMOJ, aldono de STARTO, aperas ekde 1979 sub la nova titolo - S A N O . Al nia ŝatata kaj populara bulteno ni deziras do multe da saniga legaĵo.

SVĚTADÍL BEZ TLUMOČNÍKŮ ■

KONTINENTO SEN INTERPRETISTOJ - kniha, která by neměla chybět v žádné knihovně je určena především nejširší veřejnosti, proto je psána č e s k y . Věnujte ji všude tam, kde je třeba vhodně argumentovat ve prospěch esperanta. Autor O.Knichal,formát A5, graf.úprava J. Klement, cena 13,- Kčs.

---

STARTO - nepravidelný věstník ČESKÉHO ESPERANTSKÉHO SVAZU, Jilská 10, Praha 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Za obsah odpovídá O. Knichal. Grafická úprava M. Labašta. Tisk zajišťuje Technické ústředí knihoven Praha. Předáno do tisku 25. června 1979. Dohlédací pošta Praha 07, snížený poštovní poplatek povolen Ředitelstvím pošt Praha, j. zn. P/1 - 1267/79 ze dne 6. dubna 1979.



KOVOVÉ GARÁŽE

z ocelového plechu-základní nátěr -dvoudílná vrata- sedlová střecha -bez podlahy- snadná montáž buď na podezdívku neb rovný terén.

Délka 4400 mm - cena 4.840,-Kčs
Délka 5300 mm - cena 5.350,-Kčs
Délka 6200 mm - cena 5.850,-Kčs
Šířka 3030 mm,výška 2450mm je u všech tří typů stejná.
Šířka vrat 2000 mm,výška 1900mm.

Na zakázku vyrábí a v dodací lhůtě 2-4 měsíců dodá

INKLEMO
PRAHA,v.d.
dříve Kovodílo Praha.

Písemné objednávky adresujte maloobchod.úseku Inklemo Praha, Spojovací 11, 190 00 Praha 9, tel. 830949
Osobně možno objednat v pražských prodejnách družstva. Doprava pokud není zajištěna vlastním prostředkem, bude zajištěna družstvem. Garáže dodáváme výhradně soukromníkům. Stavební povolení nutné.




ENTREPRENO »KLENOTY«